

Svisa Esperanto-Societo informas

1998 numero 3a: majo / julio

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

Vivo de SES

Tre sukcesa bazela trilanda renkontiĝo

Gratulojn ni esprimu al la bazelanoj pro la perfekte organizita trilanda renkontiĝo disvolviĝinta la semajnfino de la 21/22aj de marto. Al tiu kunveno vigle anoncita jam ekde decembro aliĝis 68 personoj venintaj reale el tri landoj: alkurintoj el Francio kaj Germanio venis ne nur el la bazela ĉirkaŭaĵo, tial la kontaktoj estis ege riĉigaj por ĉiuj. Estas ĉiam agreble renkonti novajn vizaĝoj!

La partoprenantoj aprezis la lerte gvidatajn programerojn. Unue malfermiĝis jam je la 9h30 ĝenerala kunveno de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, kaj ekde la 10h30 paralele okazis rendezuo

de aktivuloj kaj kurso por komencantoj, en kiu 2 plenkreskulojn kaj 5 infanojn instruis Nina Drewitz, nova aktivulino de Esperanto-Societo Basel, kiu loĝas en Rheinfelden.

La elektita kunveno, tiu de la evangelia eklezio metodista, montriĝis tre taŭga renkontiĝejo provizita de plurcelaj salonoj facile adapteblaj al aktivecoj diskutaj aŭ manĝaj.

Daŭre la bazelaj grupanoj oficis sub la organiztalenta gvidado de sia prezidantino Nicole Béroud-Focke. Kuireje deĵoris s-ino Susi Jufer, la prizorgisto de la kunvenejo. Ŝi pretigis la manĝojn helpe de sindonemaj kunlaborantoj. Administrantoj akceptis la alvenantojn kaj en alia budo daŭre serviĝis trinkaĵoj.

Interesaj raportoj

La rendezuo de aktivuloj iniciatita de Bruno Graf parto-

prenis kvardeko da interesatoj. Unue la gejunuloj Claudia Gessler, Vera kaj Dawid Pochanke entuziasme raportis pri tre sukcesa semajnfina kurso okazinta en Lausanne kun 12 partoprenantoj ĉe la familio Randin la 12/13ajn de aprilo 97. Instruis Nicole Margot kaj François Randin. Modesta partoprena kotizo 30-franka kovris ĉiujn kostojn: tranokteblon, manĝojn, instruadon kun kursmaterialon.

Anonciloj provokemaj estis fiksitaj en lernejoj necesoj kaj varbado ankaŭ celis konatojn. Analizo de tiu informagado montris, ke la aliĝintoj al la kurso estis jam aŭdintaj almenaŭ du- aŭ trifoje pri la ekzisto de esperanto. Tio montras la gravecon de regula poresperanta informado, kiu devus esti daŭre ripetata.

La kursanoj estis instigitaj tuj aliĝi al JES kaj TEJO. JES tiel gajnis 9 novajn membrojn kaj TEJO 7, el kiuj 5 paske jam partoprenis en Assisi la internacian TEJO-festivalon.

Estis organizitaj postaj renkontiĝoj kun legado de *Gerda malaperis* kaj propono de perkorespondaj kursoj.

Sed ekzistas problemoj, ĉar la junularo moviĝemas. Post unu jaro la plimulto el la kursanoj daŭrigas siajn studojn for de Lausanne en Italio, Kanado kaj

Svedio. Tial nepre sentiĝas neceso ripeti tiajn varbkursojn, ne nur en Lausanne, sed ankaŭ en aliaj urboj.

Dum la diskuto Nicole Margot prave alvokis je la formado de kursgvidantoj, kiuj kapablu instrui al junuloj kaj universitatanoj.

Poste Ursula Niesert, sekretarino de Germana Esperanto-Asocio, tre interese raportis pri varbado helpe de migranta informstando muntebla en foiroj kaj ekspozicioj. Ŝi donis tre gravajn konsilojn pri la alteco de la ekspoziciotablo, pri la elekto de la prezentindaj dokumentoj, kiuj ne abundu, kaj pri la maniero respondi al la demandoj de la publiko.

Sekvis David Buhlmann, la prezidanto de KCE. Li forlasis la jarkunvenon de SAEF por raporti pri la aktiveco de KCE.

Fine Ernst Glättli, sekretario de SAEF, raportis pri esperantostando, kiun SAEF prezentis dum tuta semajno en fervojista ekspozicio okazinta en la stacidomo de Olten.

Jarkunveno de SES

Tuj post la tagmanĝo Bruno Graf prezidis la ĝeneralan kunvenon de SES laŭ ritmo, kiu respegulas la dinamismon, kiun li provas doni al la societo, kiun li prezidas ekde unu jaro. La protokolo de tiu asembleo, kiu disvolviĝis en tre

agrabla etoso, legeblas en sekva rubriko.

Prelego de Claude Piron

La kultura semajnfino fakte malfermiĝis post la teumo per orator-aĵo de Claude Piron antaŭ vasta publiko, ĉar adiciigis al la aliĝ-intoj al la trilanda renkontiĝo la partoprenintoj al la asembleo de SES, kiuj plilongigis sian restadon en Basel. Estas ĉiam tre interese aŭdi Claude Piron, kiam li parolas pri la psikologiaj rezistoj al esperanto kaj pri la mondlingva problemo, kiun li bone konas kiel emerita tradukisto de la Mond-Organizaĵo pri Sano.

En la diskuto, kiu sekvis la paroladon de Claude Piron, pluraj ĉeestantoj esprimis la deziron povi akiri la koncernan preleg-tekston. Tial ni ĝojas anonci, ke ĝi ekaperis en *Heroldo de Esperanto* jam en la duobla numero 4-5 aŭ 1951-1952 de la 15a de aprilo 1998.

Program-riĉa vespero

Rakledo sekvita de bona deserto redonis viglon al ĉiuj por vespero kun abundo da programeroj alt-nivelaj.

Filmo pri la svisaj montoj de François Randin plaĉis al ĉiuj. Liselotte Oeschger, en sia raporto aperinta en la informilo *Kuriero de Esperanto* de ESB, tiel rakontas pri sia ĝuo speki best-

vivon pasintan kaj nunan: "Tiaj premsignoj de la saŭroj impresis min strange. Se oni imagas, ke ili de jarmiloj ekzistas kaj oni povas vidi ilin ankoraŭ hodiaŭ! Sed ankaŭ la vivantajn bestojn... kia beleco! kaj kia vivigo!!"

Sekvis konkurso pri Jean Tinguely prepare al vizito de lia muzeo. La gajnintoj estis Sonja Brun el Rotkreuz kaj Berthe Spalinger kaj Hans Meier el Bazelo. Lumbildoj pri la Tinguely-Muzeo montris, kiel tiu artisto ludis kaj laboris kun la movo kaj vivo.

Kantado de kaj kun Claude Piron alportis entuziasmigan konkludon al tiu belega tago.

Vizito de la urbo

La dimanĉon okazis vizito de la urbo sub la gvido de Annelies Fiechter. Post promeno en la malnovaj kvartaloj kaj longe de la rivero Rejno, ĉiuj povis ekzameni la maŝin-skulptaĵojn de Jean Tinguely (1925-1991) en la nova muzeo konstruita de la fama tiĉina arkitekto Mario Botta honore al la friburga artisto, kiu enkondukis ne nur movon, sed ankaŭ dozon da humuro en la arton.

Tiu migrado tra la bazela vivo mezepoka kaj moderna konkludiĝis per reveno al la renkontiĝejo por lasta komuna manĝo, dum kiu esprimiĝis dankesprimoj al la bazelanoj pro ties modela kun-

laboro, kies rezultoj estis neordinara aranĝo ne nur trilandaj, sed ankaŭ tridimensia: harmonie valorigis la SES-sembleon kulturaj kaj turismaj okupoj.

Claude Gacond

Ĝenerala Kunveno

de la 21a de marto 1998

Eklezia Centro, Riehenring 129

Basel

Protokolo

Ĉeestas la estraranoj Bruno GRAF, prezidanto; Perla MARTINELLI, vicprezidanto kaj itallingva reprezentanto, Anĝelo MELLINI, sekretario kaj germanlingva reprezentanto; Nicole MARGOT, franclingva reprezentanto; Ernst VON MAY, kasisto; Nicole BÉROUD, protokolanto; 35 pliaj SES-anoj kaj 5 gastoj.

Senkulpiĝis Jean-Thierry VON BÜREN kaj Madeleine STAKIAN.

La prezidanto malfermas la ĝeneralan kunvenon je la 14h15 salutante la alvenintojn, speciale la eksterlandanojn kaj dankante al la Esperanto-Societo Basel pro la organizo de la renkontiĝo.

1. Komunikoj de la prezidanto:

La prezidanto informas pri la ricevitaj senkulpiĝoj menciitaj ĉi-supre kaj prezentas la novan estr-

aron, kiu estis elektita dum la ĝenerala kunveno de 1997. Li konigas la atribuitajn funkciojn.

Estas preseraro en la publikigita tagordo: la punkto 5 estas *Celaro*, kaj *Jarkalkulo*, *bilanco*, *buĝeto* iĝas do la punkto 6. La tagordo estas tiel akceptita.

La tagprotokolanto estas Sonja Brun.

2. Elekto de la voĉnombrantoj: Barbara Pochanke kaj Ernst Glättli estas konfirmitaj en tiu funkcio.

3. Aprobo de la protokolo de la lastjara jarkunveno (15.3.97) aperinta en SES informas 97-4: Ne estas rimarkoj kaj la protokolo estas unuanime akceptita.

4. Agadraporto: La agadraporto de la prezidanto estis publikigita en *SES informas* 1998-1. Bruno Graf aldonas jenajn informojn:

- La **laborgrupo por varbado** devas laŭstatute esti aprobita de la ĜK: Tio estas unuanime akceptita.
- La **varbado** de novaj SES-membroj alportis ĝisdate 12 novajn membrojn. Tiu nombro ekzakte kompensas la anojn, kiujn SES perdis en 1997 pro ekŝiĝo aŭ morto. SES ŝrumpas; la intenco de la prezidanto estas almenaŭ stabiligi, eĉ kreskigi SESn. Sed li nur povas iniciati, puŝi. SES havas nuntempe 155 membrojn: 5 junulojn, 980 emeritojn kaj 60 anojn en la aĝo inter 30 kaj 65 jaroj. La lokaj societoj devus ekagi. Estas

necese ekvilibri la proporcion de la aĝniveleoj kaj diskonigi SES-n inter la grupoj per bona informado.

- Laŭ peto de la prezidanto, Anĝelo Mellini alportas ampleksan superrigardon al la eblecoj de la **interreto / E-majlo** kaj de ties haveblaj hejmpaĝoj. Li emfazas, ke interreto ne estas nur ludilo, sed ke ĝi vere provizas multege da informoj pri iu ajn temo kaj estas granda ŝanco por la evoluo de la homaro kaj kompreneble ankaŭ por esperanto, kiu jam estas tre bone reprezentata. Sur nur unu sola serĉvojo li ekzemple trafis 644 indikojn pri esperanto. Estas sciinde, ke SES, JES, la zurika kaj lucerna societoj jam havas propran hejmpaĝon.

Ne estas rimarkoj de la ĉeestantoj kaj la prezidanta agadraporto estas akceptita sen kontraŭa voĉo.

5. Celaro: La prezidanto informas pri la celoj de la trijara mandato. Ili estas ligitaj al la **Kampanjo 2000 de UEA.**

a) Levi la organizan kaj idean nivelon de SES, precipe:

- fortigi kaj junigi la societon.
- altigi la membronombron je 15% ĝis la jaro 2000.
- okazigi 1-2 specialajn aranĝojn jare por pliklerigi kaj aktivigi la membraron.
- kunlabori regule kun la lokaj kaj fakaj societoj por subteni la bazan laboron.

- lanĉi agadprogramon kun ILEI por varbi inter geinstruistoj kaj lernejoj.

- lanĉi agadprogramon kun JES por varbi inter gejunuloj.

b) Levi la prestiĝon de esperanto kaj de ties komunumo:

- restarigi la *Informan Servon* por la gazetaro kaj la publikaj instancoj.

- plani 2-3 projektojn jare por konigi esperanton (agotago en oktobro).

- produkti modernajn informilojn / varbilojn kaj ellabori konceptojn kaj metodojn por la varbado helpe de laborgrupo.

- krei realece kaj kuraĝe novajn bildon kaj perspektivon de esperanto.

- plani zorge la Agadon 2003 (100jariĝo de SES kaj de la esperantiĝo de Edmond Privat kaj Hector Hodler).

La ĉeestantoj dankas per forta aplaŭdo kaj unuanime akceptas tiun celaron.

Al la spita demando de François Randin: "Al kio servas esti membro de SES?" Bruno Graf respondas jene:

- SES servas al la membraro per la membrobulteno *SES informas*, kiu fakte informas pri esperanto en Svislando.

- SES-membroj ricevas favorpreze la revuon *Literatura Foiro* aŭ la gazeton *Heroldo de Esperanto*.

- por favori la praktikon de esperanto kaj la klerigon de siaj membroj SES organizas centrajn, regionajn kaj specialajn aranĝojn.
- SES eldonas *Informan Servon* por la gazetaro.

Bruno Graf konkludas, ke bedaŭrinde tamen restas pli ol 200 lokaj grupanoj, kiuj ne estas SES-anoj.

Claude Gacond sugestas aldoni la eblecon ricevi ambaŭ organojn *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto*.

6. Jarkalkulo, bilanco, buĝeto:

Ernst von May klarigas la jarkalkulon kaj la buĝeton. Venas demando de Eva Vischer: "Ĉu ne eblus malaltigi la membrotizon, se oni rezignus pri la aŭtomata abono al *Literatura Foiro* aŭ *Heroldo de Esperanto*. Claude Gacond, la redaktoro de *SES informas*, emfaze kontraŭstaras dirante, ke li tuj eksiĝus, se ne plu ekzistus kultura organo, ĉar estus tro da laboro ankaŭ zorgi pri kulturo en *SES informas*. La prezidanto komprenas la problemon kaj promesas diskuti en la estraro pri la ebleco malaltigi la SES-kotizon. Stanislaw Pochanke informiĝas pri la alta sumo de CHF 5'000.-, kiu estas buĝetita por varbado. La prezidanto anoncas, ke estas antaŭvidite eldoni varbilojn:

- plibonigo de la SES-faldfolio.

- kreo de respondkarto kaj de esperanto-prospekto por interesuloj fare de la varbgrupo.

- eldono de broŝuro, kiu anstataŭos tiun de Arthur Baur, kiu elĉerpiĝis.

7. Raporto de la kaskontrolantoj: Paul Scherer legas la raporton de la kaskontrolantoj, en kiu estas menciite, ke la librotendado estas ekzemple kaj senerare farita. La jarkalkulo, la bilanco, la buĝeto kaj la raporto de la kaskontrolantoj estas aprobitaj de ĉiuj krom 1 sindeteno. La prezidanto esprimas ĉies dankemon por la dekjara sindediĉo de la eksiĝinta kasisto Ernst von May. Eĥas forta aplaŭdo.

8. Statutsanĝo, artikolo 7a: La propono de la estraro celanta altigi la aĝlimon de la junuloj de 26 al 29 jaroj, konforme al la statutoj de JES kaj TEJO, kaj malaltigi la jarkotizon por tiu kategorio de CHF 45.- al 25.- estas unuanime aprobita.

9. Diversaĵoj: Minuto da silento memorigas la mortintojn: Hans Bipp (honora membro), Maŭro De Sassi, Mathilde Lüthi, Ardachès Stakian (honora membro) kaj Vojslav Pytloun.

Renkontiĝoj en 1998:

- **27/29 aprilo:** Renkontiĝo por esperantistoj kaj simpozio pri **La lingva dimensio de Homaj Rajtoj** dediĉe al la 50-jariĝo de la *Universala Deklaracio de Homaj*

Rajtoj kaj omaĝe al la 90-jariĝo de UEA, aranĝotaj en Genève fare de UEA kunlabore kun SES, Laŭzana Esperanto-Societo kaj "La Stelo" en Genève.

- **12/13 septembro: Regiona kultura semajnfino en Cully.**

- **Oktobro: Agotago.**

- **21 novembro: merkatika tago** (sekvo de la seminario okazinta en Luzern en 1995).

Mireille Grosjean informas, ke ŝi skribis al la organizantoj de **EXPO 2001** kaj submetis dosieron pri esperanto. Eble ni povos kunlabori kun aliaj grupoj por prezenti nin en tiu grava nacia okazaĵo. Ŝi ankaŭ aktivas en la svisa agentejo por interŝanĝo de metilernantoj kaj instruistoj kaj havis la okazon demonstri, ke esperanto povas esti helpa rimedo por trovi kontaktadresojn.

Anita Altherr invitas ĉiujn al aktiva partopreno je la lundo 27a de aprilo en Genève. Ĉeestos pluraj eminentuloj de la esperanto-movado.

Dawid Pochanke dankas nome de JES pro la subteno de SES al la JESanoj.

Franz Brügger donas mallongan informon pri la nuntempa situacio de sia projekto **Tago X**. Li dankas al la jam sinanoncintoj kaj pledas por ankoraŭ pli da helpo kaj subteno per plenigo de informilo, kiun li disdonas.

Kun vortoj de danko al ĉiuj la prezidanto Bruno Graf fermas la ĝeneralan kunvenon je la 16h15.

Rotkreuz 1998.04.14: La protokollintoj: Sonja BRUN kaj Anĝelo MELLINI.

Donacoj

La kasistoj Ernst von May kaj Barbara Pochanke dankas pro la sekvaj donacoj:

Nicoletta Beretta: 40.-; Ester Barberis: 15.-; Lucienne Dovat: 5.-; Wolfgang Gasser: 30.-; Moreno Graneroli: 25.-; Chantal Jelmini: 25.-; Alois Koller: 45.-; Ida Kuchen: 45.-; Alice Quaglia: 5.-; Dieter Rooke: 20.-; Paul Rüegg: 30.-; Heinz Sandmeier: 35.-; Rudolf Schneebeli: 15.-; Marcel Schwarz: 50.-; Suzanne Streit: 45.-; Amalie Veith: 50.-; Elsbeth Walder: 15.-; Gisèle Weil: 10.-

Agado 2003: Tazio Carlevaro: 30.-; Lydia Roth: 26.-; Lilly Schaerer: 50.-

Sekvas sciigoj pri la venonta renkontiĝo. Jam nun rezervu la koncernajn datojn en via kalendaro!

Laŭzana Esperanto-Societo

invitas vin por

la regiona semajnfino kultura de SES

la 12an kaj 13an de septembro 1998

en Cully (apud Lausanne)

Hôtel Major Davel

Programo

Grupo A:

Komencantoj-Débutants-Anfänger-Principianti-Beginners.

Grupo B:

Lingva kurso por progresantoj.

(La nomoj de la instruantoj estos anoncitaj en aŭgusto)

Grupo C: kun Claude Gacond:

Al la malkovro de la revuo

Literatura Mondo

kun oratoraj helpantoj.

La okjara efemera vivo inter-milita de la budapeŝta entrepreno *Literatura Mondo* decidige evoluigis esperanton de internacilingva projekto al matura esprimilo beletra. Indas intimiĝi kun kelkaj aŭtoroj kaj libroj, kiuj ludis ĉefrolon en tiu epokfara momento de la historio de esperanto.

Tion ni faros per laŭtleĝo kaj komento de tekst-specimenoj ĉefe prozaj, ofte humurplenaj kaj ĉiam facile kompreneblaj, kiujn ĉiu partoprenanto ricevos surloke. Tiel baldaŭ ĉiu disponos je speco de antologieto pri *Literatura Mondo* kaj ekdeziros daŭrigi la esploron de la menciitaj verkoj, kiuj ofte kuŝas forgesite en libraroj de esperanto-grupoj.

Claude Gacond estas konata kiel agrabla preleganto, kiu entuziasmigas sian publikon. Do nepre profitu tiun okazon por intimiĝi kun periodo de la esperanto-historio, kiu estas malbone konata pro manko de bazaj instruiloj.

Kiu ŝatus fariĝi oratora helpanto por la laŭtleĝo de specimena teksto, tiu ne hezitu sin anonci. Ĉiuj leg-helpontoj ricevos legotaĵon kun leg-konsiloj. Tiel ili povos sin lertiĝi hejme por la koncerna kunlegado. La adreso por sin anonci kiel oratoran helponton estas: Claude Gacond, CP 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5.

Horaro

Sabaton	12 septembro 1998	Dimanĉon	13 septembro 1998
14h00	Malfermo de la akceptejo kaj de la libroservo de KCE en la hotelo Davel.	09h30	Malfermo de la libroservo.
15h30	Inaŭguro.	10h00	Prelego, kursoj
16h00	Prelego, kursoj.	10h45	Paŭzo
16h45	Paŭzo.	11h00	Prelego, kursoj.
17h00	Prelego, kursoj.	11h45	Paŭzo.
17h45	Paŭzo.	12h00	Prelego, kursoj.
18h00	Prelego, kursoj.	12h45	Fermo de la semajnfino.
19h00	Vespermanĝo.	13h00	Ebleco de komuna manĝo por la dezirantoj.
20h30	Distra vespero.		

Kiel atingi Cully?

Per aŭtomobilo: Forlasi la aŭtovojon en Lausanne aŭ en Vevey, sekvi la lag-bordan vojon, el Lausanne al Vevey, el Vevey al Lausanne.

Per trajno: el Lausanne uzi la regionan trajnon al Vevey, el Vevey uzi la regionan trajnon al Lausanne.

La Hotelo Major Davel situas borde de la lago.

Organiza sekretario

Nicole MARGOT, ch. des Lys 4, CH-1010 LAUSANNE.

☎ (021) 653 14 67.

Ĉiuj pagoj estu senditaj al la poŝta ĝirkonto 10-77957-3, Nicole MARGOT, LAUSANNE. Aliĝo validos post la konfirma pago de la kotizo, la mendo de hotelĉambro post antaŭpago de CHF 50.- aŭ CHF 30.- en malmulte kosta loĝejo. Por mendi ĉambrojn kaj sabatan vespermanĝon, ni bezonas la aliĝilojn almenaŭ por la 10a de septembro. Tamen por esti konvene servita, aliĝu pli frue!

..... Aliĝilo

Fotokopiu tiun ĉi dupaĝan aliĝilon kaj tuj sendu ĝin al Nicole Margot, ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne

Nomo familia:

Nomo individua:

Adreso: Strato: No:

Poŝtkodo: Loko: ☎:

Mi partoprenos en la grupo: A: ; B: ; C:

Kategorioj	Kotizoj	SES-anoj	Mendoj
Kotizo (infanoj senpage)	CHF 40.-	CHF 30.-
paroj	CHF 60.-	CHF 40.-
junuloj, studentoj, emeritoj, senlaboruloj	CHF 20.-	CHF 10.-

Loĝado en Cully kun matenmanĝo	Prezoj	
Unulita ĉambro kun duŝo	CHF 110.-
Dulita ĉambro kun duŝo	CHF 160.-
Kampingejo: pago surloka.	

Pensio en Lausanne kun duŝo kaj necesejo sametaĝe (Proksime de la stacidomo. Neaŭtomobilantoj estos veturigataj)

Unulita ĉambro	CHF 55.-
Plurlita ĉambro	CHF 85.-
Matenmanĝo	CHF 6.50
Vespermanĝo elektita:	CHF

Menuo proponata por la vespermanĝo Metu krucon!

unua plado:	Franda salato kun fulmita salmaĵo.	<input type="checkbox"/>
ĉefaj pladoj	Fiŝa propono: Mikspota fiŝaĵo kun aromherba saŭco kaj vapor-terpomoj. aŭ Vianda propono: Pularda fileto kun mustardaj semoj, rostitaj terpomoj kaj ratatujo.	<input type="checkbox"/>
	Vegetaranoj	
unua plado:	Elbazara salato.	<input type="checkbox"/>
ĉefaj pladoj	Kunfunga rizo. aŭ Spinata kiŝo.	<input type="checkbox"/>
Deserto	Sezonfrukta parfeo.	<input type="checkbox"/>
Prezroj	Kompleta menuo kun 3 pladoj:	CHF 35.-
	Menuo kun 2 pladoj:	CHF 30.-
	Ĉefa plado laŭ elekto:	CHF 22.-
Vegeteranoj	Kompleta menuo kun 3 pladoj:	CHF 30.-
	Menuo kun 2 pladoj:	CHF 25.-
	Ĉefa plado laŭ elekto	CHF 18.-

Sume:

Dato:

Rimarkoj:

Subskribo:

Petu anoncilojn pri la regiona semajnfino kultura okazonta en Cully, por povi vastskale informadi pri ĝi ne nur viajn esperanto-amikojn, sed ankaŭ por instigi kolegojn kaj parencojn enskribiĝi en la stud-grupojn A aŭ B. Kaj vi mem pretiĝu aktivigi en la grupo C kiel oratora helpanto; vi certe ne bedaŭros tiun personan eksperimenton.

Pri la simpozio de UEA ĉe UN la 28an de aprilo Lingvo kaj Homaj Rajtoj

Novaj impulsoj por UEA ĉe UN

Kiel konate, ĉijare Unuiĝintaj Nacioj festas la 50-jaran datrevenon de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*, kiu ankaŭ ekzistas en esperanto. La artikolo 2a de la Deklaracio specife temas pri homaj rajtoj sen ia ajn diferencigo, inkluzive de la lingva diferencigo. En sia statuto Universala Esperanto-Asocio diras, ke "*respekto de homrajtoj estas por sia laboro esenca kondiĉo*." Tiu deklaracia jubileo kaj ankaŭ la 90jariĝo de UEA mem, kiu plenumiĝis ĝuste la 28-an de aprilo 1998, instigis la aktivulojn de UEA okazigi simpozion sub la temo "*Lingvo kaj Homaj Rajtoj*" en la Palaco de Nacioj en Ĝenevo. Tiun ĉi seminarion anticipis longa preparlaboro kun la Oficejo de la Alta Komisiito de Homaj Rajtoj ĉe UN, kiu apogis la okazigon de la jubilea konferenco.

Kvardeko da interesitoj sekvis la inviton de UEA, veni la mardon 28an de aprilo al unu el la ĉef-salonoj de la Palaco de Nacioj en Ĝenevo. Kvankam la konferenco direktiĝis unuavice al reprezent-

antoj de UN mem kaj de Neregist-araj Organizoj (NROj) kaj okazis pro tio grandparte en la angla lingvo, la plimulto de la partoprenantoj estis esperantistoj el diversaj landoj (kun parte bona kono de la angla lingvo). El Svislando ĉeestis inter aliaj Andres Bickel, d-ro Tazio Carlevaro, Armand kaj Yvonne Cotton, Claudia Gessner, Ernst Glättli, Stanislaw kaj Vera Pochanke.

Prof. Humphrey Tonkin, speciale flugis el Usono por prezidi la simpozion. Li prelegis pri *la lingvaj kaj homaj rajtoj el historia perspektivo*. Prof. Lee Chong-Yeong, le prezidanto de UEA, veninta el Sud-Koreio, pritraktis en esperanto la temon "*Lingvaj rajtoj, la fundamento de homaj rajtoj*" kaj Zdzislaw Kedzia, supera konsilanto al la Alta Komisiitino por Homaj Rajtoj, oficiale salutis la simpozianojn.

Aliaj prelegantoj estis prof. Christoph Pan, direktoro de la Sudtirola Instituto pri Etnaj Grupoj en Bozen/Bolzano (Italio), d-ro Fernand de Varennes (Bozen), direktoro de Azia kaj Pacifika Centro por Homaj Rajtoj kaj Prevento de Etnaj Konfliktoj, Cecilia Thompson de la UN-oficejo pri Homaj Rajtoj (OHCHR), Claude Piron el Coppet kaj Mark Fettes de UEA. Ĉiuj prelegoj estis

senescepte altnivelaj kaj tre valoraj. UEA planas la eldonon de broŝuro kun tiuj tekstoj. Inter la plej konataj aktivuloj troviĝis ankaŭ Brian Moon el Luksemburgo, Hans Erasmus el Nederlando kaj Povilas Jegorovas, UEA-estrarano el Litovio.

La simpozio rezultigis rekomendaron kun la ĉi sekvaj punktoj 1) la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj de UN subtenu la esploron pri lingvaj rajtoj en siaj membro-landoj; 2) la Alta Komisiito komisiu Laborgrupon pri Homaj Rajtoj por pristudi la problemojn de lingvaj rajtoj kaj rekomendi konkretan agad-programon; kaj 3) neregistaraj organizoj establu Koalicion pri Lingvaj Rajtoj por interŝanĝi spertojn kaj kunordigi sian laboron pri lingvaj rajtoj. La Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj promesis favoran konsideron de la registriĝo de UEA ĉe OHCHR kiel ne-registara organizo. La sukcesa simpozio do malfermis al esperanto kaj UEA novan pordon al UN en Ĝenevo por konigi ĝiajn ideojn pri lingvaj rajtoj kaj la bezonon de neŭtrala lingvo internacia por la bono de homaj rajtoj de lingve malavantaĝaj nacioj.

Ĉe UN funkcias pluraj oficialaj UEA-reprezentantoj. La ĉefaj estas Mark Fettes por Nov-Jorko, Hans-Michael Maitzen en Vieno

kaj Andy Künzli (kun Mario Bélisle kaj Mireille Grosjean) por Ĝenevo.

Aliaj programeroj

En Genève

Lige kun la seminario ĉe UN okazis diversaj aliaj programeroj: Lunde vespere la prezidanto de UEA renkontis dudekon da ĝenevaj kaj svisaj samideanoj en Institut National Genevois. La kunvenon kun aperitivo organizis Andres kaj Camille Bickel. La simpozion konkludis aperitivo en Café des Nations, oferita de la Urbo Ĝenevo. Merkrede matene sino Cotton gvidis la samideanojn tra Ĝenevo kaj interalie kondukis ilin al la domoj de la iama UEA-kvartalo.

En La Chaux-de-Fonds

Posttagmeze Lee Chong-Yeong en akompano de ges-roj Christian kaj Sabine Darbellay el Germanio kaj Renato Corsetti el Italio, veturis al La Chaux-de-Fonds, kie ilin akceptis Claude Gacond por vizito de CDELI kaj de la Biblioteko de la Urbo kaj por diskuto pri la nuna situacio de la esperanto-bibliotekoj. Vespere ĉiuj renkontiĝis kun dekkvino da esperantistoj unue en restoracio por komuna vespermanĝo kaj

poste en KCE por libera interŝanĝo de opinioj.

Kiel organizanto de la simpozio mi ŝatus speciale danki al miaj surlokaj kunlaborintoj Armand kaj Yvonne Cotton, Andres kaj Camille Bickel, Claude Gacond, Bruno Graf, Claude Piron, Nicole Margot kaj François Randin.

Andy E. Künzli.

C.D.E.L.I

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33,
2305 La Chaux-de-Fonds. ☎032 967
68 55. Fakso: 032 967 68 29.

Tre regule la merkredon matene Andrée Gacond kaj Cosette Sandoz venas helpi al Claude Gacond por la plenumo de precizaj taskoj. Dum Andrée ĉefe zorgas pri la registro de alvenintaj periodaĵoj, Cosette listigas la novajn librojn en la katalogo.

Aliaj helpantoj estus bonvenaj, ĉar abundas taskoj transpreneblaj de regulaj kunlaborantoj. Tiuj ĉi bonvoluloj ne necese kreskigu la merkredan laborgrupon. Ankaŭ matene la lundon, mardon kaj vendredon Claude Gacond deĵoras en CDELI, kaj dufoje monate li ankaŭ laboras la sabaton dum la tuta tago.

Movada vivo

Ni povas anonci kaj raportoj nur laŭ la sciigoj, kiujn ni ricevas. Dezirindus, ke post ĉiu esperanto-kunveno responsulo mallonge raportu al ni pri la okazintaĵoj kaj samtempe anoncu al ni la datojn kaj programon de la venontaj aranĝoj.

Limdato

La limdato por la venonta *SES informas* 1998-4 aŭgusto-oktobro estas la 31a de julio.

Basel

Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214
57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim,
Neubad.

Datoj de la venontaj kunvenoj:
28a de majo, 25a de junio, 27a de
aŭgusto, 24a de septembro, 22a de
oktobro kaj 26a de novembro.

La Chaux-de-Fonds

Esperanto-studo

En la salono de C.D.E.L.I, Biblioteko,
pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55.

La martaj, aprilaj kaj majaj
vesperoj grupigis po 3 aŭ 4 stud-
emulojn. Estis legataj eroj el
Kredu min sinjorino! de Cezaro
Rossetti, el *Aventuroj de Pioniro*
de Edmond Privat, kaj el *La ĝoja*

podio de Raymond Schwartz. Okazis diversaj paroligaj ekzercoj.

Post la somera paŭzo la studo de esperanto kun Claude Gacond en la CDELI-salono rekomenciĝos la 26an de aŭgusto je ĉiuj duaj kaj kvaraj merkredoj de la monato inter 19h45 kaj 21h45. Notu la sekvajn datojn en via kalendaro: 9an kaj 23an de septembro, 14an kaj 28an de oktobro, 11an kaj 25an de novembro kaj 9an de decembro.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45.

Venontaj kunvenoj:

Junie mardon 9an je la 15h00, restoracio Manora, Cornavin 4.

La Popola Universitato intencas starigi esperanto-kurson por komencantoj ekde oktobro 1998. Jara kosto de la kurso estos CHF 65.- por po unu horo semajne. Informu vian konataron pri tiu kurso? Enskriboj: Université Populaire de Genève, 23, rue du Vuache. ☎ 022 345 50 10.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02. Kunvenoj: 20.30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo.

La 4an de majo antaŭ publiko multnombra kaj internacia Claude Gacond rakontis pri sia 30-jara laboro poresperanta kadre de Svisa Radio Internacia. Li aŭdigis specimenon de dialoga prelego realigita kun sia edzino Andrée, sed ankaŭ la voĉojn de siaj kolegoj gesinjoroj Arthur Baur kaj Andy Künzli. Li montris kolektojn da elsendaj manuskriptoj, kiuj formas min-ejon da preleg-temoj por estontaj kunvenoj.

En junio okazos ekskurso. La regulaj renkontiĝoj rekomenciĝos la 5an de oktobro kun prelego pri la UK en Montpellier. La sekvaj: la 2an de novembro kaj la 13an de decembro: Zamenhofa festo.

Venontaj diskutrondoj en Hotelo Continental ekde la 18h00 ĝis la 20h00: 22an de junio, 14an de septembro, 19an de oktobro kaj 16an de novembro.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. ☎ 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĉiun duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum,

Gerliswilstr. 8, 6020
Emmenbrücke, atingebla per
trolebuso 2 de Lucerno kaj de la
regiona trajno ĝis haltejo-staci-
domo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

Maje 28: S-ino Annelis Dettling
prelegos pri "Mia profesio: drog-
istino, kia ĝi estis antaŭ 50 jaroj."

Wil

Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500
Wil. ☎071 911 68 30. **Kunvenoj:** 20.00
en la Restoracio Schweizerhof, Unt.
Bahnhofstr. 18.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 25 150
25

Kunvenoj: 19.15, Eisengasse 22, 8034
Zürich

Dietrich Weidmann sendis sci-
igojn pri la interreta aktiveco: "El
la tuta monda retpaĝaro mi povas
sendi nur sporade elstarajn
dokumentojn al CDELI. La
amplekso jam estas nun tiom
granda (ekzistas momente
proksimume 1500 personoj tra la
tuta mondo, kiuj publikigas
diversampleksajn retpaĝarojn
(inter 1 ĝis pli ol 100 paĝoj!) La
aktualan volumon mi taksas
mondscale je inter 10'000 ĝis
20'000 paĝoj! Tiuj paĝoj regule
aktualiĝas laŭ diversaj ritmoj.
Averaĝe modifa ritmo estas

monata. Tio do donas jaran
kvanton de 100'000 paĝoj aŭ ni
diru 1000 averaĝaj libroj! Cetere
esperanto estas mondscale la
kvina lingvo en la interreto laŭ-
kvante, tuj post la angla, germana,
franca kaj hispana, almenaŭ se oni
konsideras paĝojn kun pure
interna kaj loka karaktero.

Libro

Jan Stanislaw Skorupski ĵus el-
donis dulinge 732 sonetojn, kiujn
li skribis en esperanto kaj en la
pola dum 126 tagoj en 1995 sub la
titolo **Tempo**.

Li invitas al libro-premiero okaz-
onta la 30an de majo je la 13a
horo ĉe la putkolono sub la tilio
sur la placo Stüssihofstatt en
Zürich. Okaze de pluvo la aranĝo
okazos en la vinkelo Weinkeller
an der Stüssihofstatt 11.
Aperitivon oferos la firmao
Chrobot.

Specimene ni publikigas la
poemon, kiu portas la daton de la
30a de majo:

infanoj suferas sename
pekantoj la temon esploras
se roma lupino ne ploras
do kial blasfemi tutsame

ni vidas ke ofte infano
restadas pli besto ol homo
elĵetas gepatrojn el domo

se ili admonas pri pano
jam ĉe romianoj tre kona
"do, ut des" fariĝu omaĝo
okazos nenio malbona

ni flegis ĝis nun agnoskitajn
sed mankas civila kuraĝo
por gardi hazarde naskitajn

Naskiĝo

La 6an de marto al Marion kaj Mario Bélisle naskiĝis filo, kiu ricevis la nomon Romain, anagramo al tiu de la patrino. En La Chaux-de-Fonds gratulon al la feliciaj gepatroj kaj en Les Brenets al la geavoj Mireille kaj Yvon Grosjean, kaj ĉefe bonvenon en esperantujon al tiu bebo.

Mortoj

Svisa esperantujo ĵus perdis du aktivajn samideanojn, kiuj antaŭ ol alveni al esperanto multe suferis pro militaj kaŭzoj. Tial ili celis al homaranismo supernacia kaj homrespektema.

Mathilde aŭ Miky Luthi

La 12an de februaro mortis fraŭlino Mathilde Antoinette Luthi en sia 91a jaro. Laŭ ŝia peto estas ŝia samideanino Marie-Louise

Münger, diakro en Môtiers (NE), kiu oficis por la adiaŭa ceremonio okazinta en intimeco familia en la protestanta monaĥinejo situanta en la domaro de Grandchamp-Areuse apud Neuchâtel, kie Miky ludis apartamenton ĝis antaŭ tri jaroj, antaŭ ol ŝi estis devigita gastigi en oldulejo.

Antaŭ deko da jaroj, kiam komenciĝis ŝia malsano, kiu multe suferigis ŝin kapdolore, kun grandega bedaŭro Miky devis ĉesigi sian ĉiusemajnan kunlaboron en CDELI kadre de la merkreda dejorgrupo. Sian helpan taskon ŝi modele ekplenumis kelkajn jarojn post sia esperantiĝo, kiu koincidis kun ŝia instruista emeritiĝo en 1969. Ĉiumerkrede dum dekkvino da jaroj ŝi veturadis el Grandchamp al la biblioteko de La Chaux-de-Fonds por akurate registri kaj ordigi la periodaĵojn, kiujn CDELI ricevas el la tuta mondo.

Ŝi rapide fariĝis tre lerta kaj klera en la praktiko de esperanto, ĉar ŝi multon legis, aktive partoprenis la kulturajn aranĝojn de KCE. Kongresojn de UEA kaj de aliaj esperanto-societoj ŝi partoprenis kun entuziasmo asertante, ke esperanto donis al ŝi duan vivon. Estas pro la influo de Marc Rohrbach kaj per lia Rik-metodo, ke ŝi entuziasmiĝis por esperanto kun pluraj aliaj membroj de la movado JEAN, al kiu ŝi apartenis.

Mathilde Antoinette Luthi naskiĝis la 14an de decembro 1907 en Alzaco, tiam provinco de Germanio. Ŝia patro Frédéric Rodolphe Luthi, kiu devenis el la neŭŝatela vilaĝo Fleurier, estis direktoro de paperfabriko apartenanta al la firmao Zuber Rieder & Cie. Ĝi situis sur la insulo Ile Napoléon ĉe la kanalo de Rhône-Rhin proksime de Mulhouse.

Je la eksplodo de la milito en 1914 Svislanden rifuĝis la familio Luthi, tiam kvinmembra. Mathilde havis du fratinojn. Tiujn rifuĝintojn gastigis dum unu jaro geonkloj Jean kaj Mathilde Bovet-Luthi en Grandchamp-Areuse. Post unu jaro en 1915 la familio Luthi povis migri al Francio, ĉar Frédéric Luthi ricevis la direktadon de filialo de la paperfabriko Zuber Rieder & Cie de Ile Napoléon. Tiu ĉi situis proksime de Besançon en la vilaĝo Torpes-Boussières.

En 1918, kiam finiĝis la milito, Frédéric Luthi refariĝis direktoro de la paperejo en Ile Napoléon, kaj nun en la francaj urboj Muhlouse kaj Strasbourg Mathilde restartigis siajn studojn, kiuj konkludiĝis en 1929 per la akiro de instruista diplomo. Ŝi unue instruis en la protestanta franclingva liceo de Beyrouth profitante vojaĝi en Palestino kaj Egiptujo.

En 1934 ŝi revenis en Francion por fakiĝi kiel infan-ĝardenistino en Nice sub la gvido de sinjorino Montessori. Laŭ tiu ĉi metodo ŝi poste deĵoris en privataj infan-ĝardenoj en Arcachon kaj Parizo. Tiun lastan urbon ŝi devis forlasi je la eksplodo de la dua milito en 1939 por urĝe rifuĝi kun la gepatroj en la vilaĝon Torpes-Boussières apud Besançon. Nur en 1946 la familio Luthi venis vivi en Grandchamp-Areuse, kiam la patro emeritiĝis pro la detruo de la paper-fabrikoj de Zuber Rieder & Cie. Mathilde unue instruis en Bex en privata lernejo, antaŭ ol esti dungita en 1949 kiel infan-ĝardenistino fare de la komunumo Neuchâtel.

Claude Gacond

Ardachès Stakian

La 7an de marto je la aĝo de 88 jaroj mortis Ardachès Stakian. Li estis honora membro de SES.

Li naskiĝis la 28an de decembro 1909 en Ada-Bazar, urbeto situanta en Turkio sud-oriente de Konstantinoplo, kie vivis tridekmil loĝantoj, inter kiuj 28'000 estis armenaj kristanoj. Kunvivis grekaj kaj turkaj minoritatoj ankaŭ parolantaj la armenan lingvon, kio faciligis la enurbajn rilatojn. La ĉefa industrio estis la bredado de silk-raŭpoj kaj la produkto de silko. La armenoj ne rajtis mal-

fermi publikajn lernejojn. La eduko kaj instruo de siaj infanoj ili devis okazigi private per la helpo de instruantoj, kiuj venis el Konstantinoplo. Tiel kleriĝis Megrđitch Efendi, la patro de Ardachès. Poste, promesante ĉefe instrui la lingvon kaj skribon turkajn, li rajtis malfermi privatan armenan lernejon.

Pri ĉio tio kaj pri la subita neniigo de la armenoj fare de la turka registaro Ardachès Stakian tre interese rakontas en franclingva dokumento 87-paĝa, kiun li verkis sub la speŭdonomo Ani Arax por beletra konkurso kun la titolo "*De l'épreuve aux étoiles: mémoires 1913-1986*". Li ĝin aperigis la vendredon 11an de aprilo 1989 okaze de la 50a datreveno de sia edziĝo. En CDELI sub la signaturo ESP 4773 tiu ĉi tre interesa dokumento estas konsultebla. Ĝi ne nur rakontas pri la neniigo de la armenoj en Turkio kaj kiel Ardachès tial alvenis la 4an de decembro 1922 en Begnins kun kvindeko da aliaj rifuĝintoj, kiel ekde 1924 li frekventis la liceon "Collège Calvin" en Ĝenevo. Ankaŭ li diras, kiel li ek-lernis esperanton instruate de Henri Vatré. Unu sabaton en 1930 li estis invitita al esperanto-festo, kaj tiel li samtempe konatiĝis kun la pianistino Madeleine Vuille, kiu kantigis la esperantistojn. Ŝin li edzinigos la 11an de aprilo

1936. Tristan infanecon ŝia edzino estis travivinta pro la frua morto de la gepatroj.

Kadre de la laborista esperanto-societo kaj de la grupo "La Stelo", en daŭra kunlaboro kun sia edzino, Ardachès nelacige deĵoris favore al esperanto, gastigante fremdajn esperantistojn, presante kaj dissendante la *Brasikfolion*, kiun redaktadis Mad Mevo dum multaj jaroj, prelegante pri astronomio kaj pri feri-vojaĝoj, interalie pri pilgrima vojaĝo al sovetia Armenio kaj al la monto Ararat.

Grandan lokon Ardachès okupis en la ĝeneva esperantistaro, tial ne nur al Mad Mevo kaj al ŝiaj filinoj kaj nepino ni esprimas nian sinceran simpatian, sed ankaŭ al la iom orfaj stelanoj.

Claude Gacond

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

**83a Universala Kongreso
Montpellier: 1-8 aŭgusto 1998.**

Partoprenontoj, kiuj interesiĝas pri **kuna vojaĝo per trajno (TGV)** bonvolu kontakti la peranton:

Sonja Brun, Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz. ☎ (041) 790 46 40.

Kolektemuloj atentuj!

José Odilon Pereira de Souza estas sekretario ĉe Esperanto-kulturdomo de Universitato Federacia de Cearao (Brazilo). Li havas internacian kolekton de telefonkartoj kaj ŝatus plibonigi ĝin. Se vi havas uzitajn telefonkartojn li dankeme ricevos ilin. Li ankaŭ interesiĝus pri interŝanĝado kun alia kolektisto. Se vi povas helpi, skribu al li pere de la UEA-ĉefdelegito por Svislando: Sonja Brun, Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.

Varbcele petu disdoneblajn specimenojn de *SES informas*.

**Esperanta familia
rondo**

Fondiĝis esperanta familia rondo por gepatroj kaj idoj, kies hejma lingvo estas esperanto. Ni kunvenas ĉiumonate la unuan sabaton je la 14h30 ĉe familio Weidmann, Eisengasse 22, 8034 Zürich. ☎ (01) 251 50 25. Progame ni proponas esperantan TV-programon, distron per ludoj aŭ per migrado. Aparte ni volonte akceptos pli da porinfanaj ludiloj, videobendojn kaj sonbendoj. Samideane salutas Dieter Rooke, Äussere Klus 2, 4702 Oensingen.

Omaĝe al Mathilde Luthi

Por honorigi la memoron de Mathilde Luthi okazos kunveno en CDELI la 27an de majo je la 16h30. Marie-Louise Mürger rediros sian omaĝon kaj Claude Gacond dankvortojn nome de la biblioteko. Sekvos komuna vespermanĝo. Vespere je la 20h00 sekvos prelego de Paule Gataud pri la penso de Marc Rohrbach.